Aperas almenaŭ 3-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803

Manuskriptoj nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en part-pagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj) Ponumere 45 g (1 prk).

Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 5 (142) Korneuburg ĉe Wien, la 5. majo 1937. 14. jaro

Alvoko por

Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj.

Tuj post la estiĝo de la Esperanto-movado nia majstro d-ro Zamenhof komencis eldonadi **„Adresaron de la Esperantistoj“**, bone komprenante, ke nur la adresaro ebligus al la diverslandaj anoj de la lingvo internacia, interkomunikiĝadi pri ĉiuspecaj ideaj kaj materiaj aferoj kaj eluzi tiamaniere la valorojn de Esperanto. Kun la kresko de la Esperanto-movado transprenis la privatan laboron de nia majstro Internacia Centra Oficejo en Parizo, kiu, helpate de la firmo Hachette, mondfama libroeldonejo, ekis la mondmilito eldonadis ĉiujare amplekson adresaron de l'apartaj esperantistoj kaj grupoj sub la titolo **„Tutmonda Jarlibro“**. Post la eksplodo de la mondmilito tiu nepre necesa laboro estis bedaŭrinde malsigita.

La **Internacia Esperanto-Muzeo** (IEM), kies celo estas kolekti la tutan materialon pri la Esperanto-movado kaj disponigi ĝin al la **ĝenerala uzado,** deziras nun daŭrigi tiun malinterrompitan tradicion kaj eldoni novan **universalan adresaron** de la esperantistoj kaj Esperanto-organizoj. IEM., kiel **neŭtrala** kaj **plej universala instituto** de la Esperanto-movado, staranta **super ĉiuj apartaj organizoj kaj grupiĝoj,** sin turnas per tio al **ĉiuj esperantistoj kaj Esperanto-grupoj, tute sendepende de ilia organiza kaj partia aparteneco, kompreneble ankaŭ senkonsidere de ilia nacieco, raso, religio kaj mondkoncepto,** kaj **alvokas la tutmondan esperantistaron,** sendiference kun kiaj **labori por la starigo de la plej grandskala**

Tutmonda adresaro de la esperantistoj

kun la adresoj de la Esperanto-organizoj.

Ĉiu esperantisto anoncu al IEM. (ĉu aparte, ĉu per sia loka grupo) jenajn datojn:

1. nomo (unue familia nomo, poste baptonomo),
2. profesio kun titolo aŭ rango.

(La profesion indiku plejeble detale! Ne sufiĉas ekzemple „komercisto“, sed komuniku: importisto, eksportisto kaj de kiuj varoj, aŭ agento, magazenposedanto ktp.; ne skribu nur „profesoro“, sed aldonu: gimnazia, universitata prof. aŭ muzikprofesoro ktp.)

3. preciza adreso (lando, ev. provinco, urbo, ev. distrikto, strato, numero de la domo, kaj se necese, numero de la loĝeja pordo).

Bonvolu klare skribi, viajn nomon kaj la urbon en **nacia** lingvo, ĉion alian en **Esperanto!**

Aldono de la Esperanto-organizo, al kiu vi apartenas, estas allasata.

Samtempe kun la anonco bonvolu sendi la kotizon de 1 sv. fr. = 1 angla ŝil. =

1.20 aŭstr. ŝil. (Netoprezoj). Por tiu ĉi sumeto ne nur aperos via nomo en la adresaro, sed vi ankaŭ ricevos la kompletan adresaron, kiu jam en la unua eldono enhavos minimume 5000 adresojn.

Se vi krom la anonco de via adreso havas iajn specialajn dezirojn, ekz. volas akiri reprezentecon de eksterlanda firmo, se vi volas korespondi au interŝanĝi objektojn kaj simile, vi enmetigu en la adresaron koncizan noton. La prezo por tia aldona teksto ĝis 8 vortoj estas 1 plua sv. fr. (aŭ 1 angla ŝil. aŭ 1.20 aŭstr. ŝil.).

Sed tiu prezo de 1 sv. fr. validas nur por la **unuaj 7000** sinanoncoj. De la numero 7001 ĝis la numero 25.000 la **prezo duobliĝos** pro la pli granda amplekso kaj la pli altaj poŝtafrankoj. **Do anoncu vin kiel eble plej frue!**

La **unua eldono** de la adresaro **aperos la 15an de decembro 1937. Ĉiuj adresoj** por tiu ĉi unua eldono **devas esti ĉe IEM. plej malfrue la 31an de oktobro 1937.** Sed por faciligi al ni la ampleksegan laboron, ni petas, anoncu vin jam nun!

IEM., sur la bazo de siaj vastaj interrilatoj, **garantias** por **la unua eldono minimuman nombron de 5000 adresoj.** Sed ni estas certaj, ke pro la ĝenerala intereso pri tiu ĉi valora helpilo por la uzado de Esperanto jam por la unua eldono kolektiĝos multe pli multaj adresoj.

En la sekvantaj jaroj, laŭ amplekso de la postaj sinanoncoj, aperos komplementoj aŭ novaj eldonoj.

La adresaro estas destinita antaŭ ĉio por la sinanoncintoj. **Nur por ili** do validas la menciitaj prezoj. **Post la apero** de la unua eldono ĝi kostos en la librejo **sv. fr. 2.50.**

Pro la **graveco** de la entrepreno por la tuta Esperanto-movado, precipe por la propagando al la publiko kaj la altaj instancoj, por ĉiam pli bona eluzo de la interkomunika valoro de Esperanto, en la intereso de forta Esperanto-organizo kaj esence do en **via propra intereso** anoncu vin **tuj** kaj **instigu ĉiujn** al vi konatajn esperantistojn sin anonci!

Ĉiu Esperantogrupo agas en sia propra intereso, por demonstri la fortecon de la loka movado, varbante laŭeble **ĉiujn** siajn membrojn. **Ĉiu grupo** (kun nomo, adreso kaj kunventago) aperos en la adresaro **senpage.** Varbinte almenaŭ **10 membrojn** por la adresaro, ĝi ricevos ankaŭ la **adresaron senkoste.**

La grupoj do estas petataj kolekti la kotizojn kaj sendi ilin kun listo al la adreso de IEM. Grupoj, kiuj varbis pli ol 50 membrojn, estos krome menciitaj en „Aŭstria Esperantisto“ (AE), la oficiala organo de IEM, jam antaŭ apero de la Adresaro, tuj post la anonco. Cetere „AE“ raportos regule pri la kresko de la Adresaro.

La kotizojn bonvolu sendi tiel, ke IEM. ricevu la **netajn** sumojn de la menciitaj prezoj. Por eventualaj demandoj aldonu respondkuponon!

Por Internacia Esperanto-Muzeo:
kort. kons. Hugo Steiner.

Esperanto en la moderna vivo.

Internacia Konferenco.

Paris, 14. ĝis 17. majo 1937.

Protektoro: Ŝtatprezidanto Albert Lebrun

Provizora programo.

Vendredo, 14. V. 1937.

9 h: Malferno de la akceptejo. Libervola vizito de la Ekspozicio sub gvidado de parizaj esperantistoj.

14 h: Vizito de la Ekspozicio, laŭ arta kaj teknika vidpunktoj.

21 h: Sama vizito, nokte laŭ amuza vidpunkto.

Sabato, 15. V.

8 h: La akceptejo estas ĉiutage malfermita je la 8 h.

9.30 h: Vizito de la ĉefurbo aŭtoĉare. Instalaĵo de la diversaj sekcioj en la diversaj lokoj de la Konferencejo. Preparado de la tagordoj.

14 h: Solena malferma kunsido kun partopreno de granda muzikistaro kaj ĥoristoj (200 pers.).

16.30 h: Laborkunsidoj de la 4 sekcioj, en apartaj ĉambroj, kaj laŭ deziro, per subsekcioj.

21 h: Teatra Vespero. Unua prezentado de la bonhumora revuo de Raymond Schwartz: „Nek... nek...", ludata de la kompanio „Arto kaj Laboro".

Dimanĉo, 16. V.

9 h: Laborkunsidoj.

14 h: Daŭrigado de la laborkunsidoj.

14 h: Por tiuj, kiuj ne povis partopreni la viziton de la Ekspozicio (14. V.) vizito laŭ arta kaj teknika vidpunktoj.

16.30 ĝis 19 h: Paroladoj pri modernaj temoj de famuloj kun prezentado de filmoj aŭ eksperimentoj.

21 h: Nacia Kongreso de SEPE.

21 h: Libervola vizito de iu ajn pariza kvartalo (Latin, Montparnasse ktp.) sub gvidado de parizaj esperantistoj.

22.30 h: Ekvizito de Montmartre.

23.45 h: Eniro en noktamuzejon en Montmartre.

2 h: Tranokto, aŭ libervola daŭrigo de la vizito Montmartre-Halles ĝis la 6-a.

Lundo, 17. V.

9 h: Laborkunsidoj. Konkludoj.

12.30 h: Oficiala festeno en granda restoracio „Porte Dauphine" en Bois de Boulogne.

17 h: Solena ferma kunsido. Konkludoj de la Konferenco.

Programo muzika de la Malferma Kunsido.

I. La Marseillaise (laŭ aranĝo de Berlioz).
II. Himno por la popoloj kunvenintaj (A. Doyen).
III. Finaĵo de la 9-a simfonio (Beethoven). Himno al ĝojo (Schiller; trad. Kalocsaj).
IV. La Espero.

La kvar sensaciaj Prelegoj.

En la teatro de la Konferencejo.

Sabato, 15. majo, je la 11-a. — La koloro. Konsisto de la koloro (kun lumbildoj). Parolos (france) s-ro Toussaint, direkt. de Firmo Cartier Bresson kaj (Esp.) s-ro Saget, ĥemiisto direktoro, Elbeuf.

Dimanĉo, 16. majo, je la 11-a. — Alterigo de la aviadiloj, tra nebuloj (kun lumbildoj). Prezidos: Viceprez. de Franca Akademio pri Sciencoj A. Cotton, kiu diros kelkajn vortojn pri la mallongaj elektro-ondoj. Parolos (E.) membro de Franca Akademio pri Maro kaj prof. en Supera Lernejo pri Elektro René Mesny.

Dimanĉo, 16. majo, je la 16-a. — La bela Francujo (kun lumbildoj). Parolos (E.) Raymond de Rienzi, advokato ĉe la Apelacia Kortumo- beletristikisto.

Lundo, 17. majo, je la 11-a. — Ultrakinematografo (6000 fotoj po sekundo) kun filmoj. Parolos (france) S-ro Gérardin, inĝ. I. E. G. de firmo Merlin kaj Gérin el Grenoble kaj (E.) s-ro P. Dejean, prof. ĉe la Elektro-Teknika Instituto en Grenoble.

La oficiala festeno de la Konferenco.

Menuo.

Anserhepata pastećo, Porto-vine aromita
Ezokaj buletoj „Nantua"
Alzaca vino el la rezervejo Dauphine
—o—
Franca ŝinko kun saŭco „Périgueux"
Fungoj laŭ Pariza maniero
Vino „Haut-Pomerol" 1928 M. C.
(Vinberejo „Clocher")
—o—
Kokin-splitaĵoj en „Chablis"-jeleo
kun drakunkola aromo
Salato
Fromaĝoj
Vino „Hospices de Beaune" 1928
(Rousseau-Deslandes)
—o—
Fruktoj en Ĉampano
Fragoj
Frandaĵoj
Campano de St.-Marceaux „Brut" 1923
(en Magnum boteloj)
—o—
Kafo — Likvoroj

Por la eksterlandaj konferencanoj.

Per aliĝo al la Konferenco vi jam ricevas multan profiton en Francujo. Sed kontraŭ aĉeto de „Karto de Legitimacio", prezo 20 fr. fr. en via lando vi havos jenajn profitojn: Duonprezo por la eniro en la ekspozicio (10 enirbiletoj), se vi restas en Paris post la kongreso; rabaton sur la fervojoj en la diversaj landoj kaj aer-kompanio „Air-France", en kinoj, muzeoj, teatroj kaj en la restoracioj de la ekspozicio.

Informilo pri tio aperos en Esp.

Stenografio de la debatoj de Konferenco.

E.-stenografistoj estas petataj sin anonci kiel eble plej baldaŭ al Ĝenerala Sekretariejo de la Konferenco.

Jubilea Kongreso de Esperanto.

Warszawa, 7.—15. aŭgusto 1937.

Ĝis 30. de junio (rabato 10%): I. angl. ŝ. 31/6, II. 20/—, III. 12/6.

Pagmaniero: Al aŭstria poŝtŝparkasokonto Wien 115.973. aŭ Warszawa P. K. O. 23.445.

Vizoj: Senpaga vizo ĉe ĉiu pola konsulejo. En ČSR senpaga travojaĝ-vizo ĉe la ČSR-konsuloj. Pri aliaj tiaj senpagaj vizoj LKK klopodas.

Kontraŭ speciala legitimilo de LKK sur polaj fervojoj 33% por ambaŭ direktoj, kaj al 6-foja veturado tra Polujo.

Karavanoj el diversaj landoj. El Aŭstrio: Internacia E.-Muzeo en Wien, I., Neue Burg.

Protektoro: Ŝtatprezidanto prof. d-ro Ignacy Mościcki.

Adreso: Warszawa I, str. Chmielna 26, m. 8.

Printempofesto en Wachau

daŭros la tutan belan monaton de majo. Venu al la bela Wachau, la unika valo de Danubo, kun la antikvaj urbo Krems kaj abatejo Melk, la interesaj burgoj kaj la vinkulturataj montoj kaj — en la ĉarma ornamo de l'printempa florado.

Informojn: Fremdenverkehrsamt der n.-ö. Landesregierung, Wien, I., Stock-im-Eisen-Platz 3.

Antaŭkongreso en Praha.

En la belega antikva urbo Praha, ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio, fondiĝis Prepara Komitato, kiu vin invitas ĉeesti la 5. kaj 6. de aŭg. al Antaŭkongreso antaŭ Varsovio.

Senpaga vizito al multaj famaj vidindaĵoj; gaja vesperarangĝo. Neniu speciala kotizo! Sed aliĝintoj ricevos bele ilustritan broŝuron pri Ĉeĥoslovakio senpage. Simpla anonco sufiĉas. Sola peto: Informu pri via aliĝo sufiĉe frue! Detalaj informoj ĉe Fr. Slavik, Prepara Komitato, Praha XIX, Uralské 9.

XIX. I. K. U. E.-Kongreso.

La kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista okazos en la historiaj salonoj de „Ridderzaal" (Kavalira Salono ego) en Haag, Nederlando, de 1.—6. aŭgusto.

La kongreson antaŭos jarkunveno de „Nederlanda Katoliko" la 1. aŭgusto.

La provizora programo:

1. aŭg. Interkonatiĝa Vespero.

2. aŭg. Pontifika Meso en Preĝejo St. Jakob, ĉefpreĝejo; Solena Inaŭguro de la kongreso; festvespero.

3. aŭg. Aŭtobusekskurso tra Haag kaj Scheveningen al Jamboreo en Vogelenzang (kampfajro).

4. aŭg. Ĝeneralkunveno de IKUE; ekskurso al Rotterdam.

3., 4., 5. kaj 6. aŭg. matene Sankta Meso kun Esp.-prediko, poste laborkunsidoj.

Kongreskarto por la tuta kongreso 2.50 ned. guld., po unu tago 1 ned. guld.

Anoncoj kaj informoj ĉe ĝenerala sekr.-kas. F. Marrevee, Hugo de Grootstr. 76, Haag.

XXIV-a Bulgara E.-Kongreso, 19—21. VI. en Pazarĝik.

XXXIV-a Nacia Kongreso de SEPE en Paris la 16. majo.

1940 Universala Kongreso de Esperanto en Tokio.

En Heroldo aperis la propono, okazigi en 1940 la Univ. Kongreson en Tokio.

Tuj la japanaj esp-istoj esploru, ĉu ili povos riski inviti la kongreson por 1940. Ili tenas en la manoj la plej bonajn atingojn, kiujn iam iu LKK havis. Por garantii la sukceson „trijarplano" estas elaborenda, sed rapide. La organizan laboron transprenu la oficejo de IEL Kunlaborantoj estu ĉiuj laboremaj kaj klardaj esp-istoj. Kverelemuloj restu en la angulo, kie ili ĝis nun bonfartis.

Jen la plej urĝaj laboroj:

a) en ĉiuj landoj tuj fondiĝu „Speciala komitato por la penetriĝo de E. en la olimpiaj ludoj". (La lando, en kiu la ludoj okazos, havas la estrecon en la komitataro. Ĝis 1940 la japana komitato, kiu jam fondiĝis.)

b) ni esploru, kiel ni povos instrui amase sportulojn, precipe la japanajn. (S-ro Cseh estu gvidanto en tiu laboro.) Certe necesas sendi Ce-instruistojn al Japanujo. Kiel financi tiun entreprenon?

c) serĉi kontakton kun la olimpiaj komitatoj: internacia kaj naciaj.

d) ellaboro de vere taŭga vortaro sporta.

e) paragrafigo de la „trijarplano". La plano devas havu sinsekve la paŝojn farendajn por atingi plenan uzon de E. en la olimpiaj ludoj 1940.)

Esplorende estas, ĉu la komitatoj samtempe povos transpreni similan agadon por la JAMBOREOJ. Tiuj skoltkunvenoj internaciaj estas same gravaj kiel la olimpiaj ludoj kaj dieras je la sama lingvomalsano. En aŭgusto okazos Jamboreo en Nederlando. Kion faris la s-anoj por helpi al niaj pionieroj sur tiu kampo? — La E.-servon por la venonta Jamboreo organizas Roverskolto Moll, Raastraat 2, Leiden.

Ni ne perdu tempon.

August Weide, Tönsberg, Norvegujo.

Intervjuo kun s-ano Edgar Andrew Hornblow el Wellington, Nov-Zelando.

Farita de Hugo Steiner en Internacia Esperanto-Muzeo en Wien dum 28-a Univ.-Kongreso de Esp.

Steiner: Kiom longe vi estas for de via hejmo?

Hornblow: Dum proksimume 1 jaro.

St.: Kie vi estis la tutan tempon?

H.: Mia edzino kaj mi preterpasis la insulon Tahiti, restis tie unu tagon kaj tie havis la okazon paroli kun esperantisto, s-ano Capron, la plej okupata advokato sur la insulo. Post 2 semajnoj ni atingis San Francisco, kie s-anoj Vincent kaj Roscher klopodis pri nia komforto. S-ro Roscher, kiu verkas Fervojan Esp.-fakvortaron, helpis min aĉeti aŭton.

St.: Por kio vi bezonis aŭton?

H.: Ni intencis vojaĝadi dum tuta jaro per aŭto.

St.: Kaj kia estis via plua programo?

H.: Ni vizitis Hollywood, preterpasis la belegan Nacian Parkon Yozamite kaj travivis en societo de ges. d-ro Witt kaj Chaumotte belajn tagoj en Los Angeles. En Bahaa-klubo mi faris E.-paroladon. Ges. Chaumette (li franco, ŝi flandrino) geedziĝis dum la kongreso en Antwerpeno 1928. Ilia filino aŭdis unue nur E-on kaj tial ŝia unua lingvo estis E., kvazaŭ ŝia gepatra lingvo.

St.: Kaj kien vi venis de Los Angeles?

H.: Ni veturis trans Santa Fé, Denver, Chicago, Detroit al Windsor, kie mia bopatro J. W. Collins, komerca reprezentanto de Novzelando en USA kaj Kanado, renkontis kaj veturigis nin al Niagara Akvofalo. Gi konsistas el du partoj, inter kiuj estas insulo, kiu formas la limon inter USA kaj Kanado. La Kanada Akvofalo, la pli interesa, havas la formon de ĉevala hufoĵero kaj laŭ tio ankaŭ nomiĝas (angle Horseshoe-fall). Ambaŭ akvofaloj estas vespere grandioze lumigataj. Poste ni venis al Toronto, kie mia bopatro logas. En la E.-klubo mi faris lumbildparoladon pri Novzelando kaj ankaŭ laŭ invito de s-ano Bengough, registristo en Mc Master Universitato en Hamilton, en ĉi tiu universitato. La sekr. de Kanado E.-Asocio Todd montris al mi la urbon.

St.: Kiel vi daŭrigis vian vojaĝon?

H.: Ni reveturis al Montreal kaj per ŝipo al Southampton en Anglujo. Tri semajnojn ni pasigis en Anglujo, vizitis Londonon, Wales, Oxford ktp. Aĉetinte biciklojn en Londono ni veturis al Harwich, enŝipiĝis al Vlissingen en Nederlando, kie la del. Davidse kaj aliaj gastigis nin dum 2 tagoj. De tie al Bergen-op-Zoom, kie ni vidis la E.-monumenton, poste al Bredda-Venlo kaj fine al Germanujo.

St.: Kiun vojon vi prenis en Germanujo?

H.: Bicikle ni traveturis Elberfeld, Düsseldorf, Köln, Mainz, Würzburg, Nürnberg kaj Regensburg kaj ĉie nin alparolis esperantistoj, ĉar E. tamen bone vivas en Germanujo. Trans Passau ni venis al Aŭstrio, ŝipe al Linz, bicikle al Melk kaj ŝipe al Wien.

St.: Kiel plaĉis al vi la kongreso?

H.: La kongreso estis por mi la plej mirinda okazintaĵo dum la tuta vojaĝo. Pleje impresis min la fakto, ke la amuzaj aferoj estis en plej bona kontakto kun la laborkunsidoj, kaj la kongressemajno restos por ni ĉiama belega rememoraĵo. La inaŭguro estis impona aranĝo kaj ege plaĉis al ni la grandioza salonego, en kiu ĝi okazis. Certe neniu kongreso baldaŭ okazos en tia bela kadro. Vere ind-igis nian aranĝon la ĉeesto de la vickanceliero, ministro, reprezentanto de urbo Wien kaj aliaj eminentuloj kaj ke la vickanceliero nome de la registaro eĉ inaŭguris la kongreson per parolado kun finvortoj en E.

Kablofervojoj en Aŭstrio.

Originala artikolo por AE de **inĝ E. H. Jordan,** „Bundeskommissariat für Heimatdienst" en Federacia Kancelierejo.

En nia lando estas 12 kablofervojoj.

La kablofervojo al sur **Rax-alpo** ebligas la veturadon al sur ĉi tiu pli ol 2000 m altan „hejm"-montegon de la Wien-anoj, de kiu oni ĝuas belegan panoramon facile en tag-ekskurso el Wien.

St.: Kiel plaĉis al vi la teatraĵo?

H.: La elekto de vere aŭstria temo por la teatraĵo estis bonega ideo. La aktoroj tiel klare kaj bele elparolis kaj kantis en E., ke oni kun granda ĝuo povis kompreni ĉiun vorton. La prezentado kaj la multa ŝanĝo de kostumoj, krome la bela muziko (En Wolfgang apud la lagobord'...) restos neforgeseblaj.

St.: Ĉu vi ĉeestis Someran Universitaton?

H.: Somera Universitato tre impresis min, sed ne plaĉis al mi, ke dum la laborkunsidoj tro fervoraj s-anoj interrompis la parolantojn.

St.: Kaj via ĝenerala impreso pri la kongreso?

H.: La kongreso certe bonege sukcesis. La kongreso postlasis en mi pli grandan ideon pri la uzebleco de E. — Kaj la aŭstrianoj estas la plej agrablaj, gastamaj homoj, kiujn mi renkontis!

Gmunden.

La bela loko ĉe Lago de Traun, kie vi travivu belegan libertempon en la Esperanto-hejmo „Hotel Goldenes Schiff" je malalta prezo de aŭstriaj š. 8.20 potage, depago por kuracloko enhavata.

Mendojn senpere al „Hotel Goldenes Schiff", Gmunden, Aŭstrio en Esperanto. Esperantistoj en Gmunden je via dispono.



Belega regiono, malalta prezo, agrabla restado inter samideanoj tutmondaj!

Kongresanoj, antaŭ aŭ post via vojaĝo al Varsovio, nepre veturu kaj restu en **Gmunden ĉe Lago de Traun.**

Novarangoj ĉe Federaciaj Fervojoj en Aŭstrio.

Artikolo kaj klisoj de Federaciaj Fervojoj.

En gazetist-konferenco la prezidanto de Federaciaj Fervojoj, iama Ministro por Komerco kaj Trafiko, en la esperantistaro tre ŝatata amiko de Esperanto, Fritz Stockinger priparolis la novarangojn ĉe niaj fervojoj.

La envagonigo de varpakajoj estas tre malfacila kaj temporaba pro la diversaj formoj de la varoj, kaj ili krome estas facile difekteblaj. Por faciligi ĉi tiun specon de transporto, ni faris la arangon, ke ĉi tiuj varoj povas esti pakataj kaj transportataj en apartaj ujoj „Container", kiujn ni disponigas. Container estas daŭropakumo, kio signifas grandan avantagon por la forsendanto. Container havas enhavon de 2 aŭ 3 m³, estas konstruita el fero, ĉirkaŭ-umata de ligno kaj facile-transportebla. Post la unuaj 100 pecoj pro la granda bezono denove 700 estas postmenditaj.

Kaj sur la kampo de la persontransporto vi aŭdis el la referato de la **generaldirektoro s-ro Anton Schöpfer,** ke en la lastaj jaroj multo estas farita por malaltigi la kostojn de la veturado. Nun la Aŭstriaj Fervojoj decidis **malaltigon je 50%** por distancoj gis 50 km por reveturbiletoj kun 3-taga valideco.

La jam rabatitaj **„dimanĉo- kaj festotagoreveturbiletoj"** nun ankaŭ validos por ĉiuj distancoj **gis 170 km** kaj tiuj por distancoj kun **pli ol 170 km** (40%) restos, sed ambaŭ kun pli longa valideco.

Sed ni deziras ankaŭ pliagrabligi la restadon sur la aŭstriaj fervojoj kaj la vojagadon per pli granda komforto kaj plialtigo de la rapideco.

La belegaj, tra la pejzago rapidantaj **motorveturiloj** nun estos en pli granda nombro uzataj kaj alceligos la vojagantojn pli rapide, komforte kaj sekure.

Speciale mi devas atentigi, ke laŭ la statistiko pri la akcidentoj per trafikiloj la fervojoj estas tiu, kies uzantoj estas plej malmulte endangerigataj. Kun granda fiero mi povas konstati, ke la **fervojoj en Aŭstrio**



inter ĉiuj mezeŭropaj fervojoj, kiuj mem **en la tuta mondo** estas la plej funkciadsekuraj trafikinstalajoj, donas al siaj uzantoj **la plej altan sekurecon.**

Vi jam vidis niajn belajn **novajn trafikilojn.** Nun estas enkondukita la starigo de **kunmeteblaj ludotabletoj** inter la sidlokoj. Novajon prezentas la **Societvagonoj,** kiuj estas ekipitaj per Radioinstalajo, laŭtparolilo kaj diskoinstalajo kaj, se necese, per malgranda bufedo.

4-aksaj bufedovagonoj, kiuj krom la sidlokoj 3. klasaj ankoraŭ enhavas mangejon kaj malgrandan Bar (trinkejon), cetere multe estos uzataj. Ĉi tiuj vagonoj estos kvazaŭ la **„civitana gastejo"** krom la **„internacia hotelo"** surrada, kiun reprezentas la mangovagono.

„Sport-kuŝ-vagonoj", gis nun nur uzataj en vintrosporttrajnoj, nun ankaŭ estos envicigataj en diversajn persontrajnojn dum la ĉefvojagtagoj.

Sed veran specialajon niaj fervojoj faris por la junularo per konstruado de aparta trajno po. **ekskursoj de lernantoj.** En helaj vagonoj 600 gelernantoj povas esti transportataj. La veturiloj havas laŭtparolil-instalajon, por atentigi la infanojn dum la veturado pri la pejzago kaj ankaŭ disaŭdigi muzikon de diskoj, por amuzi la infanojn. Ankaŭ aparta kupeo por malsaniĝintoj kun apoteko enestas.

En nia laboro, modernigi niajn vagonaron por la internacia trafiko ni nun ledoremburas la sidlokojn en la 3. klaso. Sed ankaŭ la elektrifigon de niaj fervojoj ni daŭrigas kaj ni nur povas kaj povis tion fari kaj la aliajn novarangojn pro la subteno de nia registaro, al kiu ni dankas multon pro tio!

Per niaj tiucelaj laboroj ni deziras plenumi la dezirojn de nia publiko, sed ni ankaŭ multon helpis al parta forigo de la senlaboreco!

Fine mi kun granda plezuro dankas al **ĉiuj fervojistoj pro ilia oferema laboro!**



★

EL LA MONDO

Esperanto-nomoj en la komerco.

La firmo **Brüder Wüster,** Wien, donis al artikloj la nomon „aglo".

La firmo **Gustav u. Wilh. Heller,** Wien, ĉokoladfabriko, nomis bonbonon „Esperanto" kaj faris koncernajn afisojn.

Novaj ŝlosiloj:

Rusa: de G. Tupicin, prof. en Riga, Volguntes i. 10.

Germana: de Hugo Steiner, Wien, nova eld.

Fervojaferoj.

Staciestro H. Salokannel, Uusikaupunki, Finnlando, kolektas statistikon pri: a) kiom da fervojistoj en via lando scipovas E-on? b) kiom da E.-kursoj ili havas, c) ĉu la fervoja administracio subtenas la instruadon kaj kiel.

La finnaj ŝtatfervojoj per dekreto H. 1116/5671 de 4. dec. 1936 enkondukis E-on laŭeblece en la lingvajn kursojn de finnaj fervojistoj.

Ĉeĥoslovakio. „Lékařská Revue", Praha II, Palackého ul. 15 en sia numero 2. publikigas „resumon en Esperanto" pri la ĉefaj artikoloj. Imitinda.

ČSR. Nova gvidilo „Ĉeĥoslovakio", grotoj de la Klubo de ĉeĥoslovakaj turistoj Domica, Jasov kaj Bielská. 14-paga gvidilo kun multaj belaj bildoj pri la famaj grotoj.

Francujo: La urbkonsilantaro de Nantes voĉdonis dezirespriman por enkonduki E-on en la lernejojn.

Nederlanda Esperanto-Centro, Schiedamseweg 209 b, Rotterdam W aperigos baldaŭ novan verkon de Julio Baghy „La Verda Koro".



De Zell **am See,** ĉi tiu fama somer-restadejo en nia lando Salzburg, kondukas kablofervojo al la 1968 alte situita stacio sur **Schmittenhöhe** kaj ebligas en 13 minuta agrabla veturado la atingon de ĉi tiu en mirinde bela montegaro situita rondrigardloko.

Festsemajnoj en Wien

6.—20. de junio 1937.

La 11. fojon okazos Festsemajnoj kun la programa ideo, montri al la gastoj la riĉecon de la arta, sporta kaj societa vivo en Wien ĝuste en la tempo de la brileganta printempo, dum kiu la ĝardenurbo Wien prezentiĝas en sia rava ĉarmo kaj amindeco. Al la vizitantoj estu prezentota feliĉa sintezo de ĉarmoplena pejzaĝo kaj praa kulturo, kiel ĝi aliloke ne facile povas esti kreita en tia perfekteco.

La Festsemjanoj jam faris al multnombraj fremduloj multan ĝojon kaj peris respekton al Wien kaj ties kulturo.

Venu kaj ĝuu kun ni!

Ĉiujn informojn donas „Wiener Festausschuß", Wien, VII., Messepalast, Aŭstrio.

P. T. T. kaj Esperanto.

La ĝeneralpoŝtdirektoro de la nederlandaj Poŝtoj, Telegrafoj kaj Telefonoj, s-ro ing. H. M. Damme, Den Haag parolis el Radio Hilversum pri „PTT kaj Esperanto".

„... mi nur volas pritrakti la praktikan valoron de Esp., ĝian signifon por la internaciaj poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj rilatoj. La internacia poŝta interligo okazas per korespondado kaj ne gravas, ĉu la oficisto scipovas la lingvon, en kiu oni korespondas. Ĉe la telegraf-deĵoro tio ĉi estas pli grava, ĉar la telegrafisto estas peranto, per kiu la rilatoj okazas. Laŭ telefona vidpunkto necesas, ke ambaŭ oficistoj, kiuj devas interligi la parolantajn personojn, sin reciproke bone komprenu.

Pro la ĉiam pli kreskanta fremdultrafiko en la internaciaj rilatoj PTT okupas gravan rolon kaj estas tre klare, ke la studado de helplingvo estas por PTT-oficistoj tre grava fakto, de helplingvo, kiu pro sia simpleco havas adeptojn en ĉiuj partoj de la mondo.

Aro da oficistoj eklernis E-on kaj la gvidantaro de PTT-servo tre ŝatas tion kaj siavice akcelas tiun studadon.

Por montri al la fremduloj, ke la koncerna oficisto scipovas paroli E-on, ŝildetoj kun la surskribo „Oni parolas E-on" estas disponigitaj de PTT-administracio.

Ni permesas, ke esp.-leterportistoj portu la verdan stelon sur la uniformo.

Laŭ decido de Ministro-Prezidanto ankaŭ la neuniformitaj oficistoj rajtas porti dum la deĵoro la E.-insignon.

Ni ankaŭ planas okaze de nova presado de la respondkuponoj, presi ankaŭ la E.-lingvan tekston.

La honora prez. de PTT-esperantistoj, sciante mian konvinkon pri la granda utileco de Esp. kiel mondlingvo, petis min akceli, ke dum PTT-kongresoj al la lingvoj permesataj estu aldonata Esp. Je mia bedaŭro nederlanda PTT-adm. ne povas proponi tion, ĉar ĝi nuntempe ne ricevos la necesan subtenon flanke de la aliaj administracioj.

E.-movado en Swatow, Ĉinujo.

Originalraporto por AE.

Swatow Esperanto Asocio, fondita antaŭ 7 jaroj de Cijano Huan, mortinta 1934, laboris apud la lokaj taskoj multe en nacia kaj internacia E.-movado. Nun ludas gravan rolon sub gvido de s-ro C. S. Chen kiel unu potenca societo de la socia movado. La SEA-movado nek estas politika, nek religia, sed ĝi estas morala kaj kleriga movado, kiu bazas sur principoj de respekto, amo, laboro kaj studo.

Ni administras du lernejojn, unu por knabinoj kaj alian por knaboj, kaj en ambaŭ ni instruas Esperanton devige.

La 5-a ekspozicio okazis en Nova Jaro. Ĝi akiris grandan sukceson. Jen tiuj estas nur trajto de nia societo.

Esperante vian brilan progreson kun samideanaj salutoj.

Swatow Esperanto Asocio.

El lernejo en Japanujo.

Originala raporto.

Fine de marto 1935 s-ro Maruyama, direktoro de Tôkyô Huritu Dai (6 Kôtô-zyogakkô Sesa Knabina Liceo en Tokio) post longa konsidero decidis enkonduki Esp-on kiel lernejan lecionon, konsultinte kun s-ro Yosi Isiguro, fame konata espisto. Varbinte inter novaj lernantinoj s-ro Maruyama sukcesis havi 14 knabinojn, kiuj volis lerni E-on anstataŭ anglan lingvon

Radio Wien.

La E.-kurso du monatojn pli frue ol la aliaj lingvaj kursoj devis finiĝi pro novaranĝo de la programo.

Oni ne tre ŝatas E.-on ĉe Radio Wien kaj la parta enkonduko de Esp. estas speciale la merito de Ministerio por Komerco kaj Trafiko, kiu postulis ĝin.

14. majo: „Per poŝtaŭtobuso tra la ĉarma montegaro de Aŭstrio", Rudolf Ulbrich.

28. majo: „Kuraclokoj kaj somerrestadejoj en Aŭstrio", d-ro Lothar Steiner.

Radio Ljubljana.

13. majo: 22—23 h kun jena programo: Slovenaj Somerrestadejoj kaj kuraclokoj. Bled, perlo de Slovenio. Romantika Bohinj. Eskurso al Rogaška Slatina.

Karintio kreis per ĉi tiu kablofervojo al sur **Kanzelhöhe,** kiu interligas la ĉe Lago de Ossiach situitan lokon **Annenheim** kun la preskaŭ 1500 m alte situita surmonta stacio, instalaĵon, kiu alirebligas ĉi tiun klimate mirindan montegaron somere kaj vintre al ĉiuj sportuloj kaj refreŝigon serĉantoj.

en aprilo 1935, komence de 1935-lernejaro. En aprilo 1936 ni povis gajni 38 el novaj lernejanoj, sed ĉar ordinara klaso de la lernejo konsistas el 48, s-ro M. speciale varbis 10 kaj ni organizis unu klason. Kaj en aprilo 1937 ni jam havis 50 aspirantojn. Jen la tuta nombro de Esp.-lernantinoj en aprilo 1937: 14 (en la tria klaso), 44 (en dua), 48 (unua). Ili lernas po 3 horoj (precize 50 minutoj, somere 40 m) semajne. Dank' al la fervoro de s-ro Isiguro ilia kono pri E. mirinde progresis. Kiam oni festis Zamenhofan tagon en la lasta decembro, ili bonege manefestaciis ludante teatraĵojn, dialogojn, kantojn ktp.

EL LA LEGANTOROJ:

„Mi jam konas vian voĉon, ĉar mi kutimas aŭskulti la E.-lecionojn el Radio-Wien; gratulon!" St. Bencsik, Budapest.

„La gazeto estas bone gvidata kaj montras ĉiam la belecojn de via lando." Zd. A. Blažek, Mnichovo Hradiště, ČSR.

„Mi multe ŝatas vian gazeton", H. Gerisch, Picton, Kanado, Ameriko.

„Al nia klubo tre plaĉas via gazeto kaj ni reklamis por ĝi", Motala E.-klubo, Svedujo.

Estimata samideano!

Mi multe bedaŭras, ke mi estis for de Boulogne kaj mi ne povas esprimi kiom mia ĉagreno estis ne vidi vin. Ĉiam antaŭen, neniam sen propagandi, kaj ankoraŭ iom da pacienco: Ni venkos baldaŭ dank' al pioniroj tiel kiel vi estas precipe. Por nia standardo, mi povas esti kun amiko Sergeant iom fieraj.

Maurice Duchochois

(Rimarko de la red.: Duchochois, Michaux kaj Sergeant estis la aranĝintoj de 1-a Kongreso en Boulogne 1905 kaj la proponintoj de la E.-stelo. La flago unua kun la subskribo de nia majstro estas kiel donaco en Int. E.-Muzeo en Wien.)

Aŭst. Eĥo 1937, majo

Tre estimata s-ro Hofrat!

Ĉar mi estas amiko kaj komencanto de la Esperanto-movado, mi salutas vin kiel mian kuragvindanton, ĉar mi lernas el „Kleines Volksblatt", tre kore. Mi deziras al vi longan vivon, por ke vi ankoraŭ al multaj homoj povos instrui ĉi tiun lingvon. Mi mem lernas ĉi tiun lingvon diligente, ĉar mi opinias, ke ĝi estas facila. Mi estas lernanto de la 2a ĉeflernejklaso kaj konas la lingvon jam de duona jaro. Mi jam multe progresis kaj jam tre bone tradukas... Multajn salutojn kaj Vivu la Esperanto-Movado. Rupert Löschnauer, Raiding, Burgenland.

XII-Somera Universitato.

Mi gratulas pro la ekstreme bona laboro, kiun Vi faris redaktinte la volumon XII-a Somera Universitato. Estas la unuan fojon, kiam estas kolektitaj prelegoj diritaj dum la Univ. Kongreso kaj oni vidas, ke ili valoris esti presitaj kaj konservitaj. Vi scias, ke mi plurfoje kritikis Vin. Permesu, ke mi diru mian senkondiĉan laŭdon pri tiu ĉi faro.

Prof. d-ro St. Kamaryt, Bratislava, ČSR.

Gratulon al vi pro via geĵeto. Niaj skoltoj kun granda ĝojo legas ĝin. Cetere mia trupo, 30 skoltoj tendaros en Aŭstrio laŭlonge de la Danubo. E. Farkas, Szeged, Hungarujo.

Gratulon pri via uzo en AE de Esp. en la servo por la patrujo. Tre taŭgas la artikoloj pri aŭstriaj kutimoj kaj institucioj por informi la mondon pri via alloga lando.

Ewen J. Bengough, Hamilton, Canada.

Korajn gratulojn pri via arĝenta jubileo de via aliĝo al la Esp.-Movado. Esperante, ke vi longe vivos daŭrigi la bonfaron eĉ ĝis la ora jubileo...

Ella Baldwin-Smith, Barry, Angl.

Okaze de la fino de via kurso niajn plej bonajn gratulojn. Via metodo ege interesis min. Mi opinias ĝin speciale celkapabla.

C. Feder, Dresden.

„.....mi deziras al vi ĉiam kreskantan disvastigon de via bonega gazeto..." via Olaf Stören, Nötterö, Norvegujo.

„.....kun koraj gratuloj pro via bela esperantista agado," A. Tassin, La Louvière, Belgujo.



La famo de **Kitzbühel en Tirol** kiel vintrosportloko ne plej laste havas sian kaŭzon pro ĉi tiu kablofervojo al sur **Hahnenkamm.** Ĝi donas dum la vintro al la skikurantoj plenan valenveturebleeon de la 1660 m alta surmonta stacio.

Sveda Literatura Ligo
Sveda Esperanto-Federacio.

Laŭ iniciato de Sveda Literatura Ligo kunvenis 25 reprezentantoj de tiu ligo kaj de Sveda Esp. Federacio, por diskuti la eblojn starigi kunlaboran komitaton kun la celo, utiligi E-on en la internacia interŝanĝado de tia literaturo, kiu pro lingvaj kaj aliaj malfacilaĵoj alie ne povas trovi tradukantojn.

Ankaŭ aliajn taskon havos la komitato kaj oni provos interesi la svedan ŝtaton por la afero. Petskribo jam estas sendita al la koncerna ministro.

Kun intereso la esperantistaro sekvas la laboron de la komitato kaj deziras grandan sukceson.

Restarigo de la plej malnova teatro en Svedujo.

Baldaŭ la teatro de Gustaf III. en la fama malnova kastelo Gripsholm, ne tre malproksime de Stockholm, estos denove malfermata al la publiko kun prezentado de teatraĵoj el la tempo de la 18. jc.

La 19. kaj 20. de junio per la teatrajo „Le Jeu de l'Amour et du Hazard" de Pierre Carlet de Chamblain de Marivaux oni malfermos la teatron kaj festos la 400-jaran jubileon de Kastelo Gripsholm.

Sved-Internacia-Gazetservo, Stockholm.

Riĉa mondo — malriĉa mondo!

(El Germana Eklezigazeto, Tallinn, Estonujo, 1936, laŭ R. Plaskin, Pärnu, Estonujo.)

Dum la luktado kontraŭ malsato kaj mizero celkonscie daŭriĝas kaj en Ruslando miloj mortas pro malsatiĝo, atingas nin informoj el la tuta mondo, kiuj atestas pri senplana kaj neresponda mastrumagado.

Respubliko Ĉilio decidiĝis, pereigi 500.000 ŝafojn, ĉar nek por la lano nek por viando ekzistas ia uzebleco.

La forbučado de 200.000 gravedaj bovinoj, kiun la holanda registaro devis dekreti pasintan jaron pro forigo de la troo je lakto kaj butero, montriĝis nesufiĉa. Ministro por Mastrumado Steenberghe pro tio subskribis edikton, per kiu pluaj 150.000 bovinoj kaj 50.000 bovidoj estis destinitaj al deviga pereigo. El la viando oni faris konservaĵojn. El la faritaj 20 milionoj ĝis nun nur 7 milionoj povis esti vendataj. Certe ankoraŭ pluaj devigaj bučadoj okazos nur por ne malaltigi la prezojn, se ankaŭ malprofitaj negocoj el tio estiĝos.

Ĉe aŭkcio en Drunen (Nederlando) 40.000 kg da riboj estis forĵetataj, ĉar ne estis aĉetemo. La samo okazis kun 50.000 kg en Vkijemen.

En Danujo nun la bučadĉevaloj estas trioble pli multekostaj ol rasa bovino, ĉar bučadĉevaloj povas esti importataj en Francujo, sed ne bovinoj.

En Normandio la francaj fruktkulturistoj devas doni siajn pomojn al la porkoj kiel nutraĵon.

Ĉar en Litovujo estas en la lasta jaro tro multaj anseroj, sed eksporto ne estis ebla, la estraroj trovis elvojon, por utiligi la superfluajn anseramasojn kaj gardi la anserobredistojn kontraŭ perdo. Ĉiu ŝtata oficisto devis aĉeti laŭ sia salajro certan nombron da anseroj je prezo da 4 Lit (RM 1.60) po ansero. Ek-

Aachen,

la praa kronadurbo de la germanaj imperiestroj, estis vizitita de mi dum la revojo de la estrarkunsido en London.

Aachen kun 170.000 loĝantoj, kvankam ĝi havas multnombrajn monumentojn de konstruarto kaj artmetioj el 12 jarcentoj, estas moderna urbo. Kiel rezidejo de Karlo la Granda, kiu mortis ĉi tie kaj trovis sian lastan ripozejon, Aachen estis centro de la granda franka regno, dum la mezepoko kronadloko de la germanaj imperiestroj kaj unu el la plej famaj pilgrimlokoj de la kristana mondo. Kiel banloko ĝi jam estas fama depost roma tempo.

El la multaj vidindaĵoj mi nur povas iomete priskribi la ĉefajn:

Katedralo, konglomeraĵo arkitekta el la plej diversaj epokoj de kristana konstruarto, kies meza parto estas la bizanca Pfalzkapelle (kastelkapelo) de Karlo la Granda, al kiu estas antaŭkonstruitaj oriente la en 1414 finkonstruita gotika luksa ĥorejo kaj okcidente la sonorilturo. Girlando de kapeloj ĉirkaŭas la respektindan karolingan konstruaĵon, kiu enhavas multajn majstroverkojn. (Marmorseĝo de Karlo la Granda, ora predikejo de Henriko II., lustro granddimensia de Frederiko



Katedralo. Urbdomo.

Ruĝbarbulo ktp.) La trezorejo laŭ riĉeco kaj arta valoro de la ekspozaĵoj ne estas superata de iu ajn alia trezorejo de la kristaneco. Altfamaj estas la grandaj relikvejoj, Karolo-busto kaj Lotharglavo.

La altvaloraj sanktaĵoj de la Katedralo estas montrataj ĉiun sepan jaron — ankaŭ **nunjare** — de 10.—24. junio al la kredantoj.

Urbdomo, konstruita sur la fundamentoj de la malkonstruita karolinga „Pfalz" (kastelo). Gotika fasado renovigita en la 19. jc. La 45 m longa kaj 19 m larĝa Imperiestra Salonego servis de 1349—1531 kiel festsalonego por la kronadfestenoj. Sur la muroj Karolo-freskoj de Rethel. En la trezorejo la Aachen-aj Regno-juveloj — sed ne la originalaj, ĉar ĉi tiuj estas en la trezorejo de la imperiestra kastelo en Wien. En Aachen estas la precizaj kopioj kun la samaj juveloj kiel en la originaloj.

Veturu kaj rigardu ĉi tiun ege interesan urbon.

Mi havis la plezuron viziti en Aachen, mian malnovan samideaninon Buchty kaj pasigi agrablajn horojn tie. St.

zemple mezranga poŝtoficisto devis aĉeti 3, fervoja bariergardisto almenaŭ duonan ĝis novjaro. Certe ĉi tiu elvojo estas pli bona ol pereigi kaj forbruligi 100.000 anserojn.

Ni scias pri la grandega troo je kafo en Brazilio. Kion la registaro jam entreprenis por haltigi ĉi tiun troon! Vagonŝarĝoj de kafo estis ŝutataj en la maron, ŝmirataj per gudro kaj forbruligataj, fabrikataj je briketoj ktp. Sed la prezoj ne plialtiĝis.

Laŭ publikigo en ĉinaj gazetoj en la pasinta kvaronjaro du milionoj da kamparanoj en 14 provincoj mortis pro malsato. Pli ol 100 milionoj da homoj estas trafitaj de malsatego.

Pro la sekeco dum la lasta somero en la sudŝtatoj de Nordameriko regas sentebla manko je viando, tiel ke granda parto de la loĝantoj ne povas aĉeti viandon.

Pro tio ne ĉesu luktadi kontraŭ ĉia maljusteco!

Margaret L. Blaise.

Estante gasto dum aprilo ĉe mia amiko Blaise en lia vilao „Bonvenon" proksime de London, mi trovis, traserĉante lian E-bibliotekon, jenan poemon, kiun la mortintino verkis du monatojn antaŭ sia morto:

Mi amas la Sinjoron —
Li mortis ja por mi
Do vivon kaj laboron
Dediĉos mi al Li.

Minacos malamikoj
Sur tuta tera voj',
Sed ridos mi je pikoj
Pro Kristaj am' kaj ĝoj'.

Matene ĝis vespere,
Li volas gvidi min.
Se sekvos mi surtere,
Mi fine vidos Lin.

Kaj poste en ĉielo,
Kantados la anim',
Pri paco, bono, belo
Sen plor', dolor' aŭ tim'.

Sed iam mi revenos
Kun ĝoja anĝelar',
Kaj, Di-sendite, benos
al laca terarnar'.

Aŭgusto 1935.

La „Ansero" tuj alvenos.

(El „La mondo ridas".)

Sinjoro en birdovendejon eniras
Kaj al la vendisto mendante li diras:
„Mi volas rigardi tre grasan anseron."
Sed jen la vendisto nur estas lernanto,
Ne sperta pri prez', kvalito kaj kvanto.
Do al la sinjoro li diras ĝentile:
„Bonvolu atendi momenton trankvile!
Vi baldaŭ atingos ja vian aferon
Kaj eĉ la plej grasan anseron vi vidos —
Ĉar — nia estrino ja tuj alrapidos!"

Kiel oni fariĝas sia propra avo!

Angla gazeto publikigis kazon de memmortigo, pri kiu donis informon postlasita letero de la malfeliĉulo:

Mi edziĝis kun vidvino, kiu havis plenkreskintan filinon. Mia patro, vizitante nin ofte, enamiĝis en mia duon-filino kaj edziĝis kun ŝi. Per tio mia propra patro fariĝis mia bo-filo kaj mia duon-filino, ĉar ŝi estis ja la edzino de mia patro, fariĝis mia patrino.

Post kelka tempo mia edzino naskis al mi filon; — li estis la bo-frato de mia patro kaj mia onklo, ĉar li estis la frato de mia duon-patrino.

La edzino de mia patro, do mia duon-filino, naskis ankaŭ filon: li estis mia frato, sed samtempe ankaŭ mia nepo, ĉar li estis la filo de mia filino. — Mia edzino estis ankaŭ mia avino, ĉar ŝi estis la patrino de mia duon-patrino. Mi estis la edzo de mia edzino, samtempe ankaŭ ŝia nepo kaj, ĉar la edzo de mia avino estas ankaŭ mia avo — tiel mi estas mia propra avo!

Kaj tion mi ne povis plu toleri!

Trad. A. Schidloff-Wien.

POR KOMERCISTOJ:

Eksporto de varoj el Aŭstrio.

Jen artikloj por eksporto. Aliaj sekvos. Bonvolu je bezono vin turni al A. Schidloff, Wien, II., Kleine Mohrengasse 4.

Nr. 31. Ledaĵoj kiel kofroj en ĉiuj dimensioj, mansaketoj por sinjorinoj, saketoj por la foiro ktp. — Unuaranga firmo.

Nr. 32. „Haferl"-ŝuoj, dikfadene kudritaj ŝuoj por kostumoj kaj sporto kiel skio-kaj tubo-ŝuoj; nur pogrande.

Foiro de Paris

invitas per E.-leteroj, aldonante la belajn afiŝojn po 40 × 60 cm kaj 65 × 100 cm kun la surskribo „Esperanto uzata", faldprospekton kaj rabatitan enirbileton en la Foiron, kiu okazos de 15.—31. de majo Ĉiuj tiuj eldonaĵoj estas en Esp. kaj montru laŭ letero de la prezidanto E. Laroche-Joubert, membro de Komerca Ĉambro en Paris, al la komercistoj, ke grandnombro de ekspozantoj kaj vizitantoj uzas Esperanton.

Mendu senpage ĉe Foire de Paris, 23 Rue N. D. des Victoires.

Komercista Esperanto-Unio

en Radebeul-Dresden ŝanĝis sian titolon en **Komerca Unio**, por ebligi al siaj agenteoj en Portugalujo la kunlaboron. Lastaj sukcesoj:

1. Industria kaj-Komerca Ĉambro, Dresden, publikigas en sia Bulteno demandojn pri ĉe ni alvenintaj varoj,

2. Firmo Gordon, Dresden A 1, Postf. 6, eldonas prospekton pri treege taŭga motoro en Esp. (Mendu!)

Vivu la praktika laboro, ĉar en la nuna realista mondo nur praktikaj rezultoj faras impreson.

Komerca Unio: Ranft, Direktanto.

INFORMOJ EL AŬSTRIO

„Higieno-Ekspozicio en Wien", de 15. majo ĝis 15. junio en la ejarego de Viena Foiro kaj parto en la ĵus finkonstruita nova halego. La ekspozicion aranĝis Ministerio por Sociaj Aferoj kune kun la referatoj de Ministerioj por Komerco, Landodefendo kaj Agrikulturo, krome kun Federaciaj Fervojoj, Viena Foiro ktp. Parto de la ekspozicio venis el Higiena Muzeo en Dresden, inter tio „la vitra homo", maŝina funkciado de la homa korpo.

Radio Wien ĉiutage sendas per gramofondiskoj je la 12 h la sonoradon de la Katedralo de Sankta Stefano.

Monumento por Imperiestro Franz Josef I en Wien.

Komitato fondiĝis kaj intencas starigi monumenton por la „maljuna" imperiestro, kiel la popolo lin nomis en siaj lastaj

Unu el la montoj en **Supraaŭstria Salzkammergut** kun la plej belaj rondrigardoj estas **Feuerkogel** en Höllengebirge. Ĝi estas malfermata al la ĝenerala vizito per ĉi tin 3000 m longa kablofervojo kaj la ĉarma ĉirkaŭajo de Lago de Traun multe gajnas per tio.

regantjaroj; li mortis post 68-jara regado en aĝo de 86 jaroj.

Pri la loko ne ankoraŭ ekzistas certeco, sed oni deziras aranĝi la konstruaĵon de „Neue Burg" kiel monumenton por la imperiestro.

La vizitintoj de Wien certe memoros pri la ovala konstruaĵo aliĝa al Int. E.-Muzeo.

Esperanto en oficiala lernolibro.

En la nove aperinta aŭstria lernolibro pri historio por la ĉeflernejo estas notita, ke la aŭstriaj policistoj surhavas ankaŭ tabuleton kun la surskribo „Esperanto".

En la policlernejo en Wien regule estas jam depost 9 jaroj Esperanto instruata. La kursojn gvidas kortega kons. Steiner.

D-ro Josef Halban, mondfama ginekologo kaj akuŝisto, universitata profesoro, mortis en sia 66 jaro subite je korapopleksio. Li estis la edzo de l'mortinta mondfama oper-kantistino Selma Kurz kaj patro de l' juna oper-kantistino Daisy Halban-Kurz.

Novaj gvidiloj:

Oesterr. Verkehrswerbung — Varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko jam depost 1928 eldonas ĉiujare belan gvidlibron, riĉe ilustritan kaj ankaŭ ĵus aperis la nova, 46 paĝa.

Fremdenverkehrsstelle de Urbo Wien ankaŭ depost 1928 eldonas gvidilojn, tre belajn kun multaj bildoj. La nova faldprospekto ĵus aperis.

Ambaŭ gvidilojn tradukis **Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio,** Wien, I., Neue Burg. Ili ambaŭ estas riceveblaj kontraŭ 1 resp. kup. de Int. Esp.-Muzeo, Wien I., Neue Burg, Aŭstrio. Kiuj aliĝas al la **Tutmonda Adresaro,** ricevos ilin kontraŭ alsendo de la kotizo por la Adresaro **senpage.**

En la 64-paĝa libreto, kiun eldonis „Oesterr. Verkehrswerbung“ (Ministerio por Komerco) „Aranĝoj en Aŭstrio 1937“ estas sur paĝo 4 ankaŭ citita nia Kongreso. Mendu senpage: Wien, I., Nibelungenstraße.

Aŭstria **Hotellisto 1937“** jus eldoniĝis de Oesterr. Verkehrswerbung-Varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko kaj Gildo de gasteja kaj elverŝeja metioj. Ĝi ampleksas 6000 adresojn de gastejoj ĉiukategoriaj kaj la plej sciindajn indikojn pri loko, speco, minimumaj kaj maksimumaj prezoj, kiuj donas la pruvon, ke Aŭstrio kiel antaŭe spartenas al la plej malmultekostaj landoj en Eŭropo.

Aŭto-uzado. Fine de marto la nombro de aŭtomobiloj en Aŭstrio estis 106.423 kontraŭ 97.481 en la pasinta.

NOVAJ PUBLIKIGAĴOJ

„La mondo ridas.“ Bonhumoraj poemoj, deklamaĵoj por E.-grupoj. Originale verkitaj de Alois Norbert. En propra eldonejo. 16 × 10 cm, 64 paĝoj, prezo: S —.90 por Austrio, S 1.— por eksterlando. Adreso: Alois Norbert, Wien, Postamt 37, Poste restante.

La belaspekta libreto, enhavanta kvardeknaŭ bonhumorajn poemojn, plenigas mankon en la E.-literaturo, kiu estas ja sufiĉe riĉa je lirikaj poeziaĵoj, sed ne samgrade disponas pri populara poemaro. Kvankam oni renkontas inter la temoj de la libreto ofte malnovajn konatulojn, ili tamen efikas per la sprita kaj gaja formo. Specialan laŭdon meritas la simpla kaj flua stilo, kiu evitante ĉiujn neologismojn kaj atentante la logikan sinsekvon de la frazpartoj, ebligas facilan komprenon ankaŭ al komencantoj. La versoj estas tiel fluaj, ke post du-aŭ trifoja legado ili preskaŭ jam restas en la memoro. La preseraroj (8) estas facile ekkoneblaj kaj ne tro malpliigas la valoron de la bela libreto. Ĉe eventuala novel-dono oni ne forgesu aldoni indekson.

La verketo, kies malalta prezo ebligas grandan disvastigon, estas taŭga helpilo, por fari la grupokunvenojn pli amuzaj. Ni deziras al la produktema laboristo-verkisto, ke plena sukceso de tiu ĉi unua libreto ebligu al li eldonon de plua libro el lia abunda verkaro.

G.....i.

Muusses Esperanto-biblioteko. Sub tiu ĉi titolo ekaperis nova serio da broŝuritaj libretoj, 32-paĝaj. Redakcio: J. Glück, T. Jung kaj I. H. J. Willems.

N-ro 1: **„La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo“**, verkita de J. Glück, rakontas la plej sciindajn faktojn el la historio de la grandaj filozofoj Descartes, Comenius, Leibniz, Couturat, Locke, Wilkins kaj Nietzsche, kaj kiel ili okupiĝis pri la ideo de artefarita universala lingvo.

N-ro 2: **„Rusaj noveloj“** enhavas du novelojn: „La fatalisto“ de Lermontov kaj „La maljuna Eleska“ de Mamin-Sibirjak. La unua pritraktas la demandon de la antaŭdestino kaj ĉu la sorto estas influebla per la homa volo, la dua prezentas belan skizon pri vivo kaj morto de maljunulo, vivinta sole kun fidela hundo meze en fora arbaro.

Pri n-ro 3: **„De Muheddin ĝis Mundilatin“**, verkita de Teo Jung, aperos pli detala recenzo en la venonta numero.

La nova serio distingiĝas per bonaj preso kaj lingvo kaj estas senrezerve rekomendinda, egale por fuslernintoj kiel por jam progresintaj esperantistoj. Ni esperas kaj fidas, ke la nova serio estos samvalore daŭrigata; ĉar tion garantias la nomoj de la supre cititaj redaktoroj.

E. W.

Piramidenigmo.



1. Konsonanto. 2. prefikso. 3. adverbo. 4. kaptilo. 5. parto de l'kapo. 6. antaŭsciigo pri minacanta io. 7. hundraso. 8. hundraso.

En ĉiu linio oni aldonu unu literon; cetere la sinsekvo de la literoj en la unuopaj linioj estas sanĝeblaj.

Spritaĵoj.

Plentrafa.

„Doktoro, mi venas al vi danki vian lastan recepton.“

„Ĉu tiel bone ĝi efikis?“

„Jes, mi ĝin donis al mia onklo-... kaj nun mi estas lia heredanto...

Almozpetulo frapas al la pordo. S-ino malfermas kaj diras „Kial vi ne laboras, vi estas tiel forta!“ — „Vi povus esti filmostelo tiel bela vi estas kaj vi restas en la kuirejo“ rediris la almozulo. — Li ricevis tiom kiom antaŭ li neniu iam ricevis.

Du amikoj iras sur la strato kaj vidas en elmontra fenestro sandviĉojn kun anserhepatpastaĉo. Diris la unua „Volonte mi manĝus ĝin, sed la enhavo de mia monujo ne permesas ĝin“ kaj la alia „Mi ankaŭ volus ĝin manĝi, sed mia stomako ne permesas ĝin“. Rediris la unua „Ni eniru, mi manĝos kaj ci pagos“.

Anoncoj.

Anoncoj havas plej bonan efikon, ĉar la gazeto eliras al 122 Landoj; 2-linia ŝ 2.—, ĉiu plua linio ŝ 1.—.

Gvidlibro pri Rio-de-Janeiro, ĉefurbo de Brazilo. Eldonita de la Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj ĉe la Ŝtata Presejo. Dukolora kovrilo, 13 paĝoj da ilustraĵoj sur luksa papero, kaj urboplano.

Kiu deziros ĝin ricevi, bonvolu sendi peton al: Ministério das Relaçoes Exteriores, Av. Marechal Floriano, Rio-de-Janeiro, Brasil.

Hungaro deziras al Aŭstrio.

Stefano Bencsik, universitatano, Harsfa u 59/b, II. 59, Budapest VII, 21-jara, volas fariĝi profesoro de germana kaj hungara lingvoj. Por finlerni la germanan lingvon li petas s-anon akcepti lin kiel gaston dum julio-aŭgusto. Li sufiĉe bone komprenas la germanan lingvon. Li estus bona kamarado al la dom-gefiloj.

Ĉiu esperantisto devas posedi la
Oran Numeron
de The British Esperantist, 142 High Holborn, London W. C. 1, eldonita por la Jubileo de E. 48 paĝoj, kun tre interesaj artikoloj, riĉe ilustrita kontraŭ 3 resp. kup.

Por Junio: „Malgranda Kor-Jesu-Monato“
46-paĝa, aprobita de la ĉefepiskopa kancelario, ĉe la verkistino Marie Erard, Wien, Aŭstrio, X., Alxingerg. 2/31, por 50 g (en poŝtm. aŭ 1 resp. kup.). Po 10 pecoj ŝ 3.50 plus afranko 10%.

Wien: Eduard Weber, VII., Kaiserstraße 92, deziras korespondi kun tutmondo.

Filatelistoj atentu! Julio Reiner, Oberpullendorf, Burgenland, Aŭstrio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

„Aŭstria Antologio de la 20-a jarcento.“ La unua volumo baldaŭ eliros. Prezo kun afranko 4 rpk. Antaŭmendintoj kaj pagintoj de ĉiuj 6 volumoj ricevos belan kovrilon por la tuta verko! **Mendu tuj!**

„Tra Aŭstrio per aŭtobuso“, vojaĝlibro, 80-paĝa, tra la plej belaj partoj de Aŭstrio kun 70 bildoj, nur 3 resp. kup.

„Somera Universitato,
Internacia Konferenco de Instruistoj,
Internacia Konferenco de Virinoj,
dum la 28-a Univ. Kongreso en Wien 1936“ jus aperis en 64 paĝoj, 23.5×15.5 cm, kun 18 paroladoj kaj 4 rezolucioj de s-anoj el 11 landoj. Prezo kun afranko aŭ ŝ 3.— aŭ 5 int. poŝt-resp. kup. Nur malgranda stoko! Tre grava por varbado al Pentekosta Konferenco en Paris!

„Albumo de Wien“, bele bindita kun pli ol 100 bildoj kun klariga E.-teksto, nur 5 resp. kup.

Heroldo de Esperanto
ankaŭ nun aperas nepre regule, eĉ en plibonigita formo, — ĉar ni fidas, ke jam baldaŭ **revenos pli bonaj tempoj.** Petu senpagan specimenon de la eldonejo

Heroldo de Esperanto
Scheveningen (Nederl.), Harstenhoeckweg 223.

Esperantistoj!
Vi ofte esprimis la deziron havi sendependan organon, liberan por ĉiuj
Tia organo estas
la plej malkara el ĉiuj esperantaj gazetoj:
Nia Gazeto
monata, grandformata, ok-paĝa, ilustrita, internacia revuo.
Direktoro: **Georges Avril.**
Prezo de abono: 3 svisaj frankoj por 12 numeroj, nur antaŭpage.
Redakcio kaj Administracio:
ĉe **„L'Eclaireur“**, 29, avenue de la Victoire, **Nice,** Francujo.

Literatura Mondo, Budapest, IX., Saroksári ut 38—40 V 6.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 26.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist"

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des **Oesterreichischen Esperanto-Bundes**

Nr. 5 (20) Mai 1937

Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Nia Jubilea Landa Kongreso en Krems.

La 30. de aprilo posttagmeze jam alvenis aro da samideanoj el Aŭstrio, inter ili 15 el Linz sub gvidado de s-ano Kugler, kaj kunvenis vespere en la gastejo de s-ano Ehrenreich por salutvespero, Je nia granda ĝojo kaj honoro venis ankaŭ iama ministro por instruado, deputito d-ro Emmerich Czermak, honora membro de nia kongreso, kun sia sekretario d-ro Kneissler kaj lernejinspektoro Rabl. Salutite de prez. kortega kons. Steiner, lia ekscelenco per belaj vortoj salutis la kongreson dirante, ke Esperanto ĉiam estas la **unua**; la **unua** kunveno inter la diversaj en la kadro de Printempofesto aranĝotaj, **unua** kiel varbanto en Radio kaj **unua** kiel grava propagando en Aŭstria Esperantisto, por kiuj li dankas la prez. de AEA kaj la Esperanto-Varbadservon, kiu lasta disponigis Radion kaj gazeton. Li jam venis hodiaŭ ĉeesti nian feston, ĉar morgaŭ pro aliaj aranĝoj li ne povos veni. La ministro restis kelkan tempon en nia mezo kaj aŭskultis nian kantadon en Esperanto Kort. kons. Steiner respondis, ke li estos nome de E.-Varbadservo por Aŭstrio ĉiam preta, helpi en similaj kazoj. Ĝis meznokto ni restis kune en bonhumora agordo.

La **1. de majo** je la 9 h 30 nia pioniro iama provincialo de la Piarista Ordeno P. Mestan celebris **Diservon** kaj faris paroladon kun Esperanto-fino. Poste okazis rigardo de la bela, vere unika urbo, komuna tagmanĝo kaj je la 14 h

Malfermo de la Jubilea.

Ĉeestis la ĉefoj de ĉiuj oficialaj instancoj en Krems: Distriktestro kortega kons. d-ro Joh. Schauer, Urbestro studiokons. Joh. Rambŏck, Preposto kaj urbparofestro Joh. Schrimpf, por la Prez. de Distriktjuĝejo la juĝejĉefkonsilistoj d-ro Laheiner kaj d-ro Salcher, Komandoro de pontobataliono kaj Militistĉefo Kolonelo inĝ. Hugo Fischl, Komandoro de Infanteria Reg. 6, Vickolonelo Joh. Scheid, Taĉmentkomandoro de Artileria Reg. 3, Viz-kolonelo Hubert Stenzl, Ĉefo de la fervojstacio kaj Ĉefo de poŝtoficejo k. a.

Honorprezidanto de ĉi tiu kunveno estis nia **P. Mestan.**

Prez. Steiner malfermis, salutante la alvenintojn, dankis al LKK. de Krems, speciale al registara konsilisto prof. Gottfried Kern pro la aranĝo, al Urbestro Ramböck pro tio, ke ni povis kongresi en ĉi tiu bela urbo, al la prez. de „Nova Vivo" de Patriota Fronto por Malsupra Aŭstrio, s-ro Ministro d-ro Czermak, ke ĝi honore al la kongreso enmetis nian kongreson en sian programon kaj ankaŭ Esperantokantojn kaj al la Bona Dio pro la bela vetero, kaj petante la reprezentanton de la protektoro Landestro iama ministro Josef Reither, s-ron **Distriktestron kortegan konsiliston d-ron Johann Schauer je parolo.**

La parolanto esprimis la bedaŭron de la Landestro, Protektoro de ĉi tiu Kongreso, esti malhelpata veni al Krems kaj, ke li estas komisiita reprezenti la landestron, kiu deziras saluti la kongreson kaj esprimi sian pretecon ankaŭ venonte helpi. Li mem deziras danki, ke la Kongreso elektis la urbon Krems en lia distrikto kaj per tio kunhelpas al la pligrandigo kaj plifamigo de Printempofesto en Wachau. Li deziras, ke la lingva ĥaoso, estiĝinta post la turkonstruado en Babel, pere de Esperanto estu mildigota. Se la esperantistoj sukcesos trovi vojon pri uzo ĝenerala de sia lingvo, tiam ili multe kontribuos al la repaciĝo de la popoloj kaj tiam ili indas ricevi la dankon de ĉiu bonvola homo.

Sekvis la vortoj de **urbestro de Krems studkonsilisto Joh. Ramböck**: Estante la urbestro de ĉi tiu antikva urbo ĉe la elirejo de la Danubovalo Wachau mi kore dankas, ke vi afable elektis nian urbon por via Jubileokongreso kaj ke vi aranĝis ĝin en la kadro de Printempofesto nunjara. Mi dankas ankaŭ por la propagando, kiun vi tiamaniere faris por nia urbo. Mi vidas idealajn trajton en via movado, kiu estas porpaca kaj interpopola. Se vi foriros post espereble agrable pasigitaj tagoj el Krems, bonvolu ne forgesi nin, rakontu pri la ĉarmo de nia antikva urbo kaj instigu aliajn veni al ni. Ni bonkore ilin akceptos.

La prez. laŭtlegis la alvenintajn salutleterojn de Landestro Josef Reither, Intern. E.-Ligo en Heronsgate, XXIX. Univ. Kongreso de Esp. en Varsovio, „La Progreso" en C. Budějovice, juĝejdirekt. C. Feder en Dresden, Stef. Kunerth en Merano (naskita Kremsano), direkt. Schamanek (78-jara; telegramo) en Tullnerbach („Landestro Reither, gvidanto de la aŭstria kamparanaro, enkonduku en la vintrajn lernejojn Esperanton, tiam ne plu regos la kanonoj, sed la plugiloj!"), E.-grupo en Salzburg, viceprez. de AEA kalk. kons. R. M. Frey, ĝen. sekr. de AEA d-ro Höfer, Reithofer el Freiland.

S-ro Vic-urbestro de Krems d-ro Riehl senkulpigis sian foreston.

Sekvis la kutima parolado de la prezidanto Steiner pri la E.-movado germanlingve kaj finis per la vortoj: „Ni esperantistoj en Aŭstrio multe laboris por Esperanto kaj per tio por nia bela patrolando Aŭstrio." Per kantado de la E.-himno (ĉe la piano s-ano Chiba) finis ĉi tiu solena malfermo.

Generalkunsido de AEA.

Post foriro de la gastoj komenciĝis la programo de la laborkunsido:

1. Laŭtlegado de la protokolo de la pasintjara kunsido laŭ decido ne okazis.

2. Raporto de prez. Steiner: „Post la 28-a Univ. Kongreso de Esp. en Wien, kaj post la granda ekskurso „Tra Aŭstrio", ni sukcesis interesi nian gazetaron. Sekve E.-kursoj en **„Reichspost"**, **„Das Kleine Volksblatt"** kaj **„Gerechtigkeit"** kaj notetoj en aro de aliaj gravaj gazetoj. Nia Aŭstria E.-Asocio post la Brita aliĝis kiel unua al Intern. Esp.-Ligo. Ni devis rapide agi kaj aliĝi, por esti la unuaj, kaj ni agis bone, tion montras la aliĝo de ankoraŭ pli multaj Landaj Asocioj ol iam estis aliĝintaj antaŭe. Ni petas vian nunan konsenton, (Kun ĉiuj voĉoj konsentite!). En **Viena Foiro** en aŭtuno ni havis du standojn en Rotunde kaj Foirpalaco. Ni vendis tie 2000 E.-losilojn, signo pri sufiĉa intereso flanke de la publiko.

Mi persone sukcesis atingi **E.-kurson** en **Radio-Wien kaj Esp.-Varbadservo por Aŭstrio**, kiun mi jam gvidis depost 1928 sen speciala titolo, atingis **denove la vesperdisaŭdigojn** en Radio-Wien.

La **ĉefestraro de Federaciaj Fervojoj kaj Poŝto, Telegrafo kaj Telefono** alvokis en siaj Oficialaj Bultenoj al lernado de Esperanto kaj, se ne apartaj kursoj en certaj lokoj estos eblaj, al partopreno en la **„Skriba Kurso"**, eldonata de mi. Tiaj skribaj kursoj, daŭrigotaj 1937/38, estas bona varbilo por nia movado.

E.-Varbadservo por Aŭstrio sukcesis eldonigi denove E.-gvidilojn flanke de Ministerio por Komerco kaj Trafiko (Oesterr. Verkehrswerbung), Fremdenverkehrsstelle de Urbo Wien kaj Viena Foiro.

Aŭstria Esperantisto depost Novjaro eliras al 120 landoj kaj per tio ege varbas por Aŭstrio en alilandaro. La registaro kun granda intereso sekvas ĝian evoluon kaj helpas ĉi tiun bonan varbilon por Aŭstrio.

En interkonsento kun AEA la E.-Varbadservo klopodis pri starigo de **„Somer-restadejo"** en Ǿmunden. AEA nun prizorgos plue ĉi tiun aferon. Ankaŭ starigo de **vintrosportlokoj** interkonsente estu aranĝota. AEA sub sia nomo aranĝos tion kaj E.-Varbadservo helpos propagande.

Multaj aliaj sukcesoj estiĝis!

Nun post laboro en la gvidado de AEA kun unu funkciperioda interrompo **depost 1923** mi decidis pro la gravaj laboroj, efektivigotaj de mi: **Intern. E.-Muzeo, E.-Varbadservo por Aŭstrio kaj Aŭstria Esperantisto, eldonado de Tutmonda Adresaro kaj Aŭstria Antologio,** ne plu akcepti oficon en nia organizo aŭstria.

Je la fino mi deziras tute precize denove klarigi mian vidpunkton koncerne **kunlaboron de ĉiuj aŭstriaj esperantistoj.** Mi ĉiam deziris la kunlaboron. **Provoj:** 1. En 1924 AED invitis ALLE (la tiaman Aŭstrian Laboristan Ligon Esperantistan) partopreni en la propagando per grandaj tabuloj en ĉiuj Vienaj Fervojstacioj. La adresoj de ambaŭ organizoj kaj de ĉiuj grupoj estis indikitaj; 2. por la SAT-Kongreso en 1925 en Wien mi persone atingis laŭ peto de la tiama prezidanto de ALLE, ke ili povis atendi la kongresanojn sur la peronoj de la Vienaj stacioj. Ili ricevis tabletojn kun E.-flagoj sur la perono kaj senpagan enirbiletojn por la komitatanoj. 3. En 1926 AED aranĝis grandan Landokongreson en Hofburg kaj laŭ mia instigo invitis ALLE al partopreno, mon-

trante per tio, ke ni „aparte marŝas, sed komune manifestas". „Pro principaj kauzoj" nia propono estis malakceptita. 4. Post la malfeliĉaj februartagoj en 1934 la prez. de ALLE venis al mi en la Muzeon kun sia sekretario, por peti mian helpon, kiun mi tuj konsentis. 5. Ni komune verkis alvokon al la s-anoj, antaŭe en ALLE, invitante ilin al aliĝo al AEA, por esti denove en la vicoj de veraj amikaj esperantistoj. 6. Por plifaciligi al ili ĉi tiun paŝon, ni akceptis la lastan prezidanton en la Estraro de AEA. 7. Tuj post fondo de AEF s-ro prez. petis, ke ni ne malhelpu ilian laboron. Ili ankaŭ ne intencas fari tion. Ni ne malhelpis ilin. 8. En februaro 1936 mi en priparolo kun la prez. de AEF diris, ke mi volonte rezignus en la intereso de Esperanto, se poste AEF aliĝu al AEA. La respondo estis, ke AEF neniam aliĝos al AEA. 9. Laŭ mia propono ni havis trifoje priparoladojn kun estraranoj de AEF por eventuala starigo de Reprezenta Komitato kun la celo aranĝi kursojn kaj agi komune en la intereso de E. Interkonsento ne okazis.

Vi scias, ke mi lastan aŭguston nur akceptis kontraŭvole la prezidantecon kaj nur por unu jaro kaj ne por la tuta funkciperiodo.

Mi jam antaŭ monatoj anoncis mian rezignon pro jenaj kialoj: 1. ĉar la laboro farigis tro multa, 2. ĉar mi havas pli gravajn taskojn per gvidado de Int. Esp.-Muzeo, E.-Varbadservo kaj Aŭstria Esperantisto, per kiuj mi povas multe helpi al la movado, sen estri ĝin kaj 3. ĉar mi volis servi al Esp., pensante, ke mia posteulo — kaj mi gajnis por ĉi tiu ofico s-ron reg. kons. Stengel, kiu ĝis nun ne tro multe estis en la centro de la movado, ebligos, ke en certaj aferoj fruktodona kunlaboro kun la Federacio servos al Esp.

Mi ne ŝanĝis mian vidpunkton. Kiel prez. de AEA mi devis zorgi por la „oficiala" rolo de AEA; kiel prez. de IEMW kaj E.-Varbadservo mi ŝatas kiel eble plej vastan komunan laboron. Personaj ambicioj devas postresti. **Mia persona ambicio** estas, rezigni kiel prezidanto, por **servi al Esperanto.**

Mi ĝojus, se mia ŝatata posteulo sukcesos!

Kiel honorprezidanto (depost 1930) mi faros mian eblon helpi.

Sed tamen kelkaj **antaŭkondiĉoj** por kunlaboro devas esti: **Celo** de la organizoj devas esti varbi, por povi organizi. Sed **ne devas** okazi, ke oni varbu en la vico de la alia organizo, sed oni varbi inter novuloj kaj inter tiuj, kiuj ne apartenas al organizo. Ekz. ĉe gazetoj **ne devas** okazi, ke unu organizo klopodu ricevi la lokon, kiun jam atingis la alia. Ekzistas sufiĉa ableco varbi aliajn gazetojn ktp. **Ne devas** okazi, ke unu organizo kritiku la alian. La okazaĵoj en iu organizo estas ĝia propra afero kaj la alia ne enmiksu sin. **Ne devas** okazi, ke per la organo, cirkulero, buŝe au iel alie oni laboru kontraŭ la alia, ĉar ni devas **sen-venenigi** la atmosferon kaj ne venenigi ĝin.

Se estos ludata „Fair Play", se la organizoj laboros lojale en sia speciala kampo de organizado, tiam ni antauenpuŝos la movadon en Aŭstrio kaj — E.-Varbadservo helpos en tio!

Raporto de la kasisto E. Werner, kontrolita de la revizoroj H. Kail, kaj A. Schidloff.

Kassagebarung im Geschäftsjahr 1936/37.

Einnahmen:			Ausgaben:		
Übernommener Kassastand . .	S	483.83	Propaganda	S	659.03
Eingenommene Mitgliedsbeiträge	S	412.04	„Die zweite Sprache für alle", Oktober 1936 bis April 1937 an Druck und Versand	S	154.62
Verkauf von E.-Schlüsseln bei der Herbstmesse 1936	S	181.40	Kanzleierfordernisse	S	27.90
Überschuß aus der Abrechnung des E.-Weltkongresses in Wien	S	356.87	Porto- und Buchungsgebühren .	S	140.10
Aus dem E.-Kurs des Herrn Präs. Hofrat Steiner	S	83.—	Abfuhr der Spenden für den verstorbenen Direktor Rob. Kreuz	S	145.50
			Verbliebener Kassasaldo . . .	S	389.99
Summe	S	1517.14	Summe	S	1517.14

La kunvenantaro dankas al la kasisto kaj donas senŝarĝon.

Entute pagis 618 personoj por 1936.

3. **Novelektoj:** Prez. reg. kons. **Fritz Stengel**, vicprez. kalk. kons. **R. M. Frey, Otto Müller**-Klagenfurt; sekr. instr. **Hermann Schnell**; kas. instr.-ino **Marie Fiedler**; gazetservo d-ro **Emil Pfeffer**; propagando **Rud. Ulbrich.** Konsilantoj: prof. d-ro **Christanell**-Salzburg, reg. kons. prof. **Gottfried Kern-Krems**, insp. **J. Kugler**-Linz, **R. Kühlbacher**-Innsbruck, **E.-Werner**-Wien. (Unuanime elektitaj.)

Prez. reg. kons. Stengel transprenas la prezidantecon: „Mi dankas korege por via konfido kaj mi promesas, ke mi sincere klopodos, ankaŭ meriti vian konfidon kaj kontenton. Se mi nuntempe akceptas la elekton kiel prez. de AEA, mi faras tion nur laŭ la deziro unuavice de mia tre ŝatata honorprezidanto Steiner kaj de diversaj flankoj kaj mi estas ankaŭ konscia pri la malfacileco kaj samtempe graveco de ĉi tiu ofico. — Mi nur volas fari mian program-paroladon, kiu estas tute ne longa,

sed kiu konsistas nur el **unu frazo**: „Krom la multaj agoj, kiuj ĉiam atendas gvidanton, mi havas antaŭ ĉio la plej gravan celon, atingi la **amikecan** kaj en la senco de nia majstro **samideanan kunlaboron** de ĉiuj aŭstriaj esperantistoj, nature — mi akcentas — de ĉiuj aŭstriaj esperantistoj, kiuj vere staras sur la bazo de nia **patrolando Aŭstrio**. La plej proksima tasko: estu kreata Komitato, supoze, ke la ĝeneralkunveno konsentas (poste unuanime akceptite) el po 5 membroj de AEA kaj AEF, kiu reprezentu la tutan Aŭstrian esperantistaron. En la lasta jaro jam dufoje tia komitato kunvenis, bedaŭre sen sukceso; mi volas esperi, ke mi sukcesos tiun fojon. La nomo estu „**Reprezentanta Komitato**“ (R. K.), kio signifas „**Roko**“, je kiu ĉiuj malagordoj kaj malamikaĵoj **disrompiĝu**!

Mia unua ago kiel prez. estas, eltutkore danki unuavice al s-ro Honorprezidanto kortega konsilisto **Hugo Steiner** pro lia senlaca kaj sukcesplena laboro por Esperanto. Mi memorigas pri lia kreado de Int. E.-Muzeo, Radio-kursoj, Esp.-Varbadservo por Aŭstrio kaj pri la lasta Viena Universala E.-Kongreso, kiu finiĝis kun nenia deficito, plue pri la gazeto AE, kiun la registaro tre estimas pro ĝia grandioza varbado por nia patrolando. — Mi petas, ke nia ŝatata honorprezidanto ankaŭ estonte helpu al nia E.-movado ĉe kompetentaj instancoj de la ŝtato ktp.“ (Granda aplaŭdo.)

Prez. de Katolika Unuiĝo Esperantista **Leop. Chiba**. „Permesu, ke mi nome de mia unuiĝo kaj persone danku al s-ano Steiner pro liaj grandaj klopodoj. Kvankam kelkfoje ekzistis malsamopinio inter ni, vi ĉiam estis ĝentilmaniere helppreta kaj helpis. Ĉiu devas konsenti, ke vi vere multege laboris por nia movado kaj por tio ni volas kore danki al vi kaj ni petas la benon de Dio por via plua laboro.“ (Granda aplaŭdo.)

Vere emociite **Honorprez. Steiner** respondis kaj dankis al ambaŭ parolintoj pro la belaj kaj sinceraj vortoj. „Mi ĉiam estos ankaŭ venonte preta, helpi **kiam ajn** vi bezonos min.“

Al punkto 6 ĉefdel. Weber de IEL invitas al aliĝo, por ke AEA gajnu la premion de 200 sv. fr., kiun IEL disponigos al tiu organizo, kiu procente pleje progresis.

Al 7. S-ro **Ulbrich** transdonas ampleksan propagandoprogramon kaj Honorprez. **Steiner** proponas instali „**Libroservon**“ por havigi al AEA pluajn monrimedojn. Fino de la kunsido.

Post la laborkunsido ni komune iris al Theaterplatz, sur kiu estis konstruita mezepoka foiro kun budoj kaj scenejo, sur kiu profesiaj aktoroj ludis mezepokajn teatrajetojn. Honore al nia kongreso „**Gaja Teatro**“ („Nova Vivo“ de „Patriota Fronto“) sub gvidado de H. Herdegen prezentigis 3 kantojn de Schubert en Esperanto en la traduko de reg. kons. Stengel. Antaŭ granda publiko la gracia kantistino **Lili Bara-Wien**, post antaŭa anonco flanke de s-ano Steiner — kun ĉarma voĉo belege elparolante nian lingvon, kantis „Serenado“, „Truto“ kaj „Al la muziko“. Granda aplaŭdo sekvis ĉiun unuopan kanton.

Vespere bela amuzprogramo, tiel bela, ke simila ĝis nun ne ankoraŭ estis en niaj kongresoj. Detala raporto en junia numero.

La 2. de majo: Rigardo de la urbo kaj ekskurso al Dürnstein.

La tuta aranĝo kaj la laborkunsido okazis en bela harmonio kaj agordo!

Alvoko al kunlaboro!

Elektita kiel prezidanto de AEA mi vokas ĉiujn membrojn de AEA labori kun mi al plua interna repaciĝo kaj al la disvastigo de nia afero, kiel okazis ĝis nun sub la gvidado de mia ŝatata antaŭulo. Samideanan saluton kaj sinceran reciprokan konfidon!

AEA:**Stengel**, prez., Wien, XVII., Syringg. 3.

IEL — Junularo.

Nova esprimo, pri kiu vi baldaŭ aŭskultos pli multon. Poru hodiaŭ sufiĉu, ke estas fondota organizo de la gejunuloj esperantistaj, kompreneble ne kontraŭorganizo al iu ajn organizaĵo, sed nova helpo al nia movado. La organizon transprenas mi kun helpo de aro da entuziasmaj junulamikoj; la ideo venis de s-ano inspektoro Josef Kugler en Linz, kiu jam havas pli ol 30 junulojn kunigitajn. La statutoj jam estas pretaj kaj transdonataj al la registaro.

Junulamikoj — temas pri gejunuloj de 14—21 jaroj —, kiuj deziras kunlabori, skribu al mi, Wien, I., Neue Burg.

Steiner.

KUE, Wien, I. Ebendorferstr. 6/I. Sonntag, 23. Mai, Ausflug nach Maria Enzersdorf. Dort um 5 Uhr hl. Segen und Esperanto-Ansprache (von P. Albert Hasenhütl OFM.) in der Wallfahrtskirche. Treffen ab 3 Uhr im Pilgerhof. Nähere Auskünfte bei KUE jeden Mittwoch von 18 bis 20 Uhr oder telephonisch bei Esperanto-Klub (Tel. R-27-803).

Esperantogottesdienst entfällt im Mai.

Wien: Esperanto-Klub. Unsere Zusammenkünfte finden ab 18. Mai jeden Dienstag ab 18 Uhr wieder in der Wiener Molkerei, 2. Bez., Hauptallee 3, statt. Kommen Sie zahlreich. Gäste willkommen. Wechselndes Programm mit Gesang. Erster Ausflug am 23. Mai mit KUE. Auskünfte: Tel. R-27-803.

Rubriko por lernantoj ek de junio.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer“, Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.